# Pri la estetiko de la beletra verko: Aktualaj kontraŭdiroj (Parto II)

*Ignat Florian* BOCIORT *(RO)*
Universitato de *Timişoara*, Rumanio

Resumo
La ĉefa temo de la dua parto de tiu artikolo estas la grava problemo pri la *estetika progreso* de la beletraĵoj. La tradicia estetiko neis tiun progreson, apogita sur *kvar eraraj tezoj*, nome
- la artverkoj ne estas kompareblaj,
- en la arto, tute diference de la situo en la sciencoj, ne ekzistas metodo aŭ principoj lerneblaj,
- en la artoj ekzistas nur progreso kadre de "historiaj serioj", pri kiuj parolis *Benedetto Croce*,
- la arto estas "unikaĵo", tute sen komunaj elementoj de unu verko kun aliaj verkoj.

La aŭtoro montras
- la eraron en la teorio de *Kant* (*La kritiko de la juĝkapablo*) en la komparado de arto kaj scienco,
- la eraron de *Croce* en sia *Estetiko*,
- la sen filozofian bazon de la "teorio pri la unikaĵo de la artverko" kaj
- la erarojn, intuicie determinitajn, en la komparado de la artverkoj.

Grafika modeligo de la sistemteoriaj aspektoj de la artverko kaj de la estetikaj rezonadoj pri ĝi helpas la alproprigon de la nova problemaro, kiun la aŭtoro estis prezentinta en sia du-voluma *Estetica literara*, aperinta en 1995.

## Enkonduko

La temoj priparolataj en tiu Parto II de prelegserio kaj studkurso, okazintaj en Junio/Julio 1996 kadre de la 81a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Prago kaj la samtempa kaj samloka 16a Sanmarina Universitata Studadsesio (SUS-16) de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino estos la jenaj: 1e) Progreso, stagnado kaj regreso de la estetika valoro; la verko kiel komponanto de memlernanta sistemo; 2e) Grafika modeligo de epigona kaj de kreanta verkisto; 3e) Kelkaj propozicioj de la estetiko bazataj sur la modeligo de la verka agado, kaj 4e) Difino de la estetiko el praksiologia vidpunkto.

Parto I aperis en *Scienca Revuo* n-ro 170, volumo 48 (1), Junio 1997, paĝo 19-28.





## *I. Progreso, stagnado kaj regreso de la estetika valoro: la verko kiel komponanto de memlernanta sistemo*


Por respondi la demandon, kiel kaj kial la estetika valoro progresas, stagnadas kaj regresas, ni konsciu pri du sugestoj de la sistemteorio.

a.) Se tuta reala mondo estas -kiel jam menciite- sisteme strukturita, tiam ĉio estas dispartigebla en komponantojn. Ni ja vidis komponantojn de la beletra vero. Nu, la tradicia estetiko kaj pluraj hodiaŭaj teoriuloj malakceptas la dispartigon de la verko en komponantojn. Ili principe akceptas la analizon kiel logikan procedon, sed asertas, ke la artverko -nur ĝi!- ne estas dispartigebla, ke per tiu procedo oni detruas la valoron: la verko iĝas "kadavro sur la ĥirurgia tablo". Heŭristika eraro![9] Konfuzo inter *esplora* kaj *aplika* momentoj en manipulado de sistemoj. Certe, dispartigita en elementojn funkcias nek beletraĵo, nek la homa korpo, nek la teknika aparato, sed sen tiu ekkona momento oni ne komprenas eĉ meĥanismon de simpla ludilo. Ĝuste la perfektigo de la elementoj kaj de iliaj interrilatoj estas la ĝenerala vojo al progreso de ĉiuj sistemoj. La sistemteoria tezo tiurilate estas: *ĉiuj sistemoj progresas per la parta, ne egala kaj ne samtempa evoluo de la komponantoj* kaj de ties interrilatoj. Tio estas la *ĉefa principo pri la progresoj de la sistemoj*. Por konstati progreson, stagnadon aŭ regreson de la beletro ni devas ne "ĝenerale" kompari verkojn, verkistojn aŭ epokojn, sed atente kompari -kiel jam dirite- la elementojn de iliaj modeloj, la funkcikapablon de tiuj elementoj en rilato kun niaj postuloj.

b.) Ni bezonas koncepton pri *memlernantaj sistemoj*. Tiuj estas sistemoj, kapablaj analizi kaj taksi la proprajn spertojn, lerni el ili, kaj plibonigi siajn kondutojn por atingi pli altan rezulton en la nova agado. La nepra kondiĉo de tiuj memlernantaj sistemoj estas, ke ili enhavu almenaŭ unu komponanton, kiu kapablas analizi kaj taksi. Nu, la beletraĵo estas inerta objekto, ĝi ne kapablas analizi ion. Sed ĝi povas esti rigardata kiel elemento de sistemo *Artisto (A) - Verko (V) - Publiko (P)*, kiu estas memlernanta sistemo, ĉar la publiko kaj la aŭtoroj kapablas analizi la rezultojn de antaŭa agado. Tiu sistemo *A - V - P* kreas la verkojn kaj decidas pri ilia destino en la socio, do necesas rigardi, kiel tiu sistemo funkcias. Por simpligi tian ŝarĝon, ni ne rigardu la tutan socion, ĉiujn aŭtorojn kaj verkojn kune, sed ni reduktu tiun makrosistemon al mikrosistemoj intuicie pli facile percepteblaj en ĝiaj komponantoj kaj funkcioj, nome *ni rigardu literaturan rondon,* beletran cirklon, kie unu aŭtoro legas beletraĵon, la ĉeestantoj aŭskultas kaj aprecas ĝin. Do, la literatura rondo enhavas la samajn tri komponantojn A - V - P (komparu Bildon 1). A skribas la verkon V, do uzas materian sistemon (paperon k.t.p.) por ke sia estetika informo povu alveni al la aŭskultantoj P, kiuj prijuĝas la valoron, la kvaliton de la verko laŭ certaj kriterioj, pli aŭ malpli argumentante per objektivaj, ideale *fakaj* konsideroj, la subjektivajn

[9] Heŭristiko estas teorio pri sciencaj esploroj; la vorto devenas el la greka *eŭreka*, per kiu Arĥimedo esprimis la ĝojon de malkovro.

impresojn, opiniojn pri la komponantoj (ideoj, personoj, lingvo k.t.p.) kaj pri la verko entute. La aŭtoro aŭskultas, kio ŝajnas "bona", "bela" al la publiko kaj kio "malbona", "maltrafa"; li primeditas la rimarkojn, lernas el ili (la publiko entenas ankaŭ tre kvalifikitajn legantojn, kritikistojn, teoriulojn) kaj tiel li plibonigas sian kreadkapablon: liaj fortoj en nova kreadprocezo ne plu estas la antaŭaj - A - , sed pli grandaj: $A_1$. Tiu returno de la kreita informo al la kreanto aŭ, pli ĝenerale, la influo de la efiko sur la kaŭzo nomiĝas, kiel sciate, *retrokupl(ad)o* (france: *rétroaction* ; germane: *Rückkopplung* ; angle: *feed-back*). Ĝi estas la demiurgo de ĉiuj progresoj kaj estas propra al ĉiuj memlernantaj sistemoj.




Bildo 1

Do, $A_1$ superas al A ($A_1 > A$), ĉar malaperis el ĝi iuj nevalidaj elementoj estintaj en A kaj aldoniĝis kelkaj validaj, kiujn A ne havis. Samtempe $A_1$ konservas grandan, validan parton de A. Nu, surbaze de $A_1$ la aŭtoro reskribas la verkon, sed, kompreneble, ne plu la verkon V, sed novan, superan verkon $V_1$ ($V_1 > V$), ĉar ĝi nun entenas pli da estetika informo. Tamen, ankaŭ la publiko ne restas la sama dum monatoj aŭ jaroj - ankaŭ ĝi ja evoluas, lernas el diversaj estetikaj spertoj, studoj k.t.p., do la verkon $V_1$ ne plu aprecas "la sama" publiko P, sed $P_1$ ($P_1 > P$). Nun $P_1$ denove komunikas al la aŭtoro siajn opiniojn, sugestas al li novan, superan informon -per nova retrokuplo- kiu kondukas al supera verkista kapablo $A_2$ ($A_2 > A_1$). Tiu nova kreadkapablo ne plu verkos la sistemon $V_1$, sed $V_2$ - supera al $V_1$ ($V_2 > V_1$). Tiel, kun ĉiu nova retrokuplo aperas serio da verkoj V, $V_1$, $V_2$, $V_3$ . . . $V_n$, principe supreniranta, pli altkvalita. Samtempe kaj interrilate disvolviĝas ankaŭ la sistemo P en $P_1$, $P_2$, $P_3$ . . . $P_n$, aperas en la socio novaj postuloj, "nova estetika konscienco", kaj la antaŭaj stadioj de la beletro ne plu kontentigas. Kompreneble, evoluas ankaŭ la verkista konscien-



co, la sistemo A en $A_1$, $A_2$, $A_3$ . . . $A_n$. Tial la klasikuloj de ĉiuj kulturoj verkas pli altkvalite ol la antaŭuloj. Tia evoluo videblas ankaŭ en la "Enkonduko", kiun *William Auld* skribis en la "Esperanta Antologio", kaj montriĝas ankaŭ en la eseo de *Gaston Waringhien* "De unu antologio al alia".

Laŭ tiu simpligita grafika modelaĵo progresas, evoluas supren, la beletro en la socio. Tuja konsilo por juna verkisto: Verku kaj analizu la verkojn en fakaj rondoj! Iuj potenciale kreantaj gejunuloj kolektas senfine slipojn por .... iam skribota grandega verko, sed nenion komencas, nenion n u n skribas: tio estas la psikologia eraro de fiaskonta kapabla homo - en beletro aŭ en la scienco. Do la supreniranta direkto de la beletro respondas al objektiva leĝo, karakteriza por ĉiuj memlernantaj sistemoj (biologiaj kaj parabiologiaj), kiuj per taksado de antaŭa *provo kaj eraro* evoluas ascende. Ili ne evoluas al certa, antaŭe fiksita punkto, sed celas optimuman adaptiĝon de la kreaĵoj al ĉiam pli altaj - ĉiuokaze ne simple "novaj" - postuloj de la aprecanta homaro.

Kial do la progreso ne estas daŭra kaj senfina? Tio klarigeblas per tri gravaj faktoroj: la unua universala, la dua biologia, la tria socia.

a.) La *universala faktoro* estas la *entropio*, tiu ĉiopova diktatoro, kiu, per siaj neforigeblaj leĝoj, pli aŭ malpli frue detruas senescepte ĉiujn sistemojn, ĉiujn organizitajn strukturojn kaj transformas ĉion en senforman amason de nestrukturitaj elementoj[10]. Do la universala, superhoma tendenco en la literaturo estas *la regreso*, la perdo de informo kaj de organizado.

b.) La *biologia faktoro* de stagnado kaj regreso estas fakte kunligita al la antaŭa: neniu biologia aŭ sur biologio bazita sistemo povas evolui senfine. Ĉiu naskota homo, ĉiu planto aŭ fenomeno havas en si programitan dimension; ili ĉesas evolui kiam la imanenta programo signalas tion. La ĝenroj kaj specoj de la beletro prenas la formon al si specifajn kaj ĉesas la disvolviĝon - fenomeno jam rimarkita en la "Poetiko" de Aristotelo. La antikvaj tragedioj ne plu evoluis dum la "Aleksandria epoko". Necesis nova serio de teatraĵaj verkoj dum la Renesanco, ekzemple per *Shakespeare*. Sed ankaŭ tiu ciklo finiĝis. (Kompletigo en AIS-seminario: Teorioj pri ciklaj evoluoj en filozofio -*Gianbattista Vico*- en literaturhistorio -*Benedetto Croce*- kaj aliaj).

c.) La *socia faktoro* de stagnado kaj regreso en la beletro havas du komponantojn. *Unue*, ekzistas *sociaj interesoj*, kiuj neas kaj malapogas la ideon de progreso ĝenerale, precipe en moralo, arto, politika vivo kaj aliaj aspektoj

---

10 La spiritaj, ideaj sistemoj estas, kompreneble, multe pli fragilaj ol la materiaj. Tial la objektoj longe povas resti en nia domo, sed la informojn ni rapide forgesas. Ni forgesas ilin "sen iu ajn strebo", ĉar la fenomeno estas "spontanea", entropie determinita. Tial ankaŭ en nia loĝejo la malordo aperas spontanee: hazarde neniam povas aperi ordo, kiu necesas strebojn, organizajn principojn, negentropian (t.e. kontraŭan) energion akiritan per nutrado k.t.p. Kiu ne plu povas nutradi sin, tiu mortas kaj transformiĝas en sensistemajn elementojn laŭ eternaj leĝoj de la entropio.

de la homa konscienco. La homoj estas ofte ligitaj al malnovaj strukturoj, do pro interesoj, pro antaŭjuĝoj aŭ aliaj mensaj meĥanismoj -iufoje pro simpla stulteco - malfavoras novajn ideojn. Ni esperantistoj spertas tiun faktoron ofte. *Due*, krom la interesoj, en socia vivo aperas "sinceraj" epistemologiaj eraroj, kaŭzitaj kutime de la intuiciaj kaptiloj - ĉar la intuicio tute ne estas certa konilo en la sferoj neatingeblaj per la sensorganoj.

En la estetiko, almenaŭ kvar erarigaj tezoj neas la progreson de la valoro: 1) La "nekomparebleco" de la verkoj, verkistoj, skoloj (ĉar, kiel jam dirite, oni komparas ilin "ĝenerale"); 2) La tezo pri la artverko kiel "unikaĵo" (ĉar oni vidas nur la individuecon de la fenomenoj, ne ankaŭ iliajn komunajn trajtojn); 3) Oni neas la "lernadon", la metodon en artoj (ĉar jam *Kant*, en sia "Kritiko de la juĝkapablo" vidis en arto nur la kreaĵon, dum en scienco kaj tekniko nur la imitaĵon. Analizo de tiu koncepto troviĝas en mia artikolo "Informo, metodo kaj estetika progreso" en *Aktoj de Internacia Scienca Akademio Komenius*, vol.I, 1992); 4) Oni akceptis estetikan progreson nur kadre de "historiaj cikloj" (*B. Croce*), ĉar en tiuj cikloj la progresoj estas intuicie videblaj.


La progresoj en arto aŭ moralo, en la politiko aŭ en la kredoj, ŝajnas nerealaj, ĉar oni komparas ilin kun la rapidaj progresoj en sciencoj kaj tekniko. Sed oni konsideru jenajn aspektojn: 1. Por la teknikaj aŭ sciencaj progresoj, kiujn estas tiom facile demonstri praktike, la homoj kaj la homaj kolektivoj havas grandajn, eĉ vivotenajn interesojn - ekzemple en interhomaj konfliktoj; 2. La scienco kaptas grandegajn fortojn de la naturo kaj metas ilin en novajn eltrovaĵojn. Tiajn aspektojn, favorajn kaj rapide videblajn, la arto kaj la moralo ne havas. Tial ili progresas malrapide, sed ni observu *ke tia evoluo estas natura*, ĉar ankaŭ la naturo malrapide kreskigas la arbojn, ŝanĝas la sezonojn. La rapidegaj evoluoj estas aventuraj saltoj, ofte katastrofaj. Krome, multas jam la majstroverkoj de la homaro kaj malfacilas progresigi la koncernajn valorojn, kompare al relative linia progresoj de la scienco. La konatan proverbon, taŭgan por diversaj metodoj, "ĉiu komenco malfacilas", *Goethe* renversis: En la artoj, la komenco facilas; pli malfacilas la pluevoluo, la daŭrigo de gravaj atingoj. Certe, tiuj problemoj necesas apartan, pli fundan traktadon, kiun mi faros aliloke.

## *II. Grafika modeligo de la epigona kaj de la kreivkapabla verkisto*

La modelo de supre diskutita beletra rondo ebligas alproksimiĝon al la ideo de stagnado kaj progreso en du por tio tipaj situoj: tiu de la *epigono* (senmerita posteulo de gravaj kreantoj) kaj tiu de la *vere talentita*, eble genia kreanto (komparu Bildon 2).

La linio M - N disigas la konkretan, objektivan mondon disde la subjektiva, interna, en la homa konscienco ekzistanta mondo. La sistemo S reprezentas la ĉiujn ekzistantajn beletraĵojn en la kulturhistorio. La sistemo C reprezentas la parteton, kiun legis la epigona verkisto - do tiu, kiu ne






Bildo 2

kapablas progresigi la beletron. Kion li komprenas de tiu legita parto, tio reflektiĝas en sian konsciencon: tiel naskiĝas lia abstrakta "modelo de la beletro" en lia menso - la sistemo $C_1$. Kompreneble, $C_1$ povas aŭ egali la informon ekzistantan en C aŭ malsuperi ĝin (pro natura perdo de informo). Neniukaze $C_1$ ne enhavas la veran gravan informon ekzistantan en la tuta sistemo S. Nun li intencas mem verki beletraĵon, tial, laŭ normala psikologia procezo, li konceptas en sia konscienco la imagon de tiu beletraĵo; tiel naskiĝas la sistemo $C_2$. Poste li surpaperigas ĝin, do li skribas -sur la konkreta plano- la verkon $C_3$. Kompreneble, $C_3$ similas al $C_2$, tiu similas al $C_1$ kaj tiu similas al C, do la "nova" verko $C_3$ ne evoluigis la beletron, ĝi nur ripetis la jam konatan estetikan informon, la antaŭajn abstraktajn modelojn de la koncernaj ĝenro, speco, epoko. Por la jam menciita perdo de informo, pro la nekompreno de grava informo ekzistanta en la sistemo S, kaj pro manko de intelektaj aŭ afekciaj fortoj, la epigono ne povas tion, kion jam povis -kaj *sciis*- la grandaj antaŭuloj. Do la verko $C_3$ povas nur malsuperi aŭ, en favora kazo, esti egala al la sistemon S. La formulo de epigono estas: $C_3 < S$.

La vera kreanto de nova majstroverko legas kaj studas atente ne nur pli grandan parton de S, sed *la plej valoran parton* de ĝi, ne legas hazarde, sed cele orientite - laŭ la principo: oni devas legi ne "bonajn", sed nur *tre bonajn* librojn; oni devas serĉi *valorojn* en la kulturo, ne simple "mortigi tempon". La sistemo A reprezentas tiun parton de la sistemo S, kiun la genia verkisto studis. Tiu ĉi sistemo A ankaŭ reflektiĝas en la verkistan

konsciencon en la sistemon $A_1$. Nun la granda verkisto, talentita, kulturita kaj sperta, rimarkas, ke parto de sistemo $A_1$ ne plu validas. Li forĵetas tiun parton el sia abstrakta modelo. Samtempe li konservas, kiel supre vidate, la validaĵojn de la sistemo A, kaj aldonas al tiu proprajn estetikajn informojn, kreitajn per kaptado de informoj venintaj el la "Nekonato" kaj per propra meditado: li aldonas la informon K. Lia abstrakta modelo pri la supere funkcianta beletro estas nun $A_1 + K = A_2$, supera al $A_1$, ĉar enhavas pli da estetika informo. Surbaze de tiu $A_2$ li intencas mem verki beletraĵon, do ankaŭ li unue konceptas tiun beletraĵon: tiel naskiĝas la sistemo $A_3$, kiun poste li surpaperigas, kreante la verkon $A_4$. La legantoj havas nun je dispono verkon superan al la antaŭe konataj. La formulo de kreanta verkisto estas $A_4 > A$. Kompreneble, kion mi diris pri epigono kaj pri kreanta verkisto, tio validas ankaŭ por epigonaj kaj kreantaj epokoj.

## *III. Kelkaj propozicioj de la estetiko bazitaj sur la modeligo de la verka agado*

La teorio pri la memlernantaj sistemoj ebligas evidentigi la veron de kelkaj tezoj, parte konataj aŭ supozataj en la tradicia estetiko, sed ofte kontraŭataj. Mi elektos el tiuj tezoj iujn propoziciojn, kiel ekzemplojn.

*Propozicio A* . Estante pli aŭ malpli supera al la sistemo A, la sistemo A4 (la evoluinta verko) entenas tamen la validajn informojn de A, do ĉiu progreso estas samtempe kontinueco kaj malkontinueco. Ĝi ne povus aperi sen A - kvazaŭ ĝi estus aperinta el nenio aŭ alveninta de alia planedo. Sekve, la majstroverko neniam povas esti "absolute originala", "tute revolucia", kiel supraĵe iufoje esprimas sin beletristoj. Ĝi povas esti nur tiom originala, kiom da nova informo alportis la aŭtoro per la sistemo K. La strebo al "absoluta originaleco" estas faktoro de regreso. Iuj gejunuloj volas esti "absolute originalaj", tial ili glitas al strangaĵoj kaj ekstravaganco, ne ŝatas kaj ne legas grandajn aŭtorojn por ... ne esti influataj. Ili fakte troviĝas en la situo de embriono, kiu nutriĝas nur per la substanco de propra ovo, aŭ agas kiel primitivuloj, kiuj ne profitis de la homara kulturo. Ili forgesas, ke lignaĵisto, kiu hodiaŭ vendas radon, ne nur vendas sian propran radon, sed ankaŭ la laboron de tiuj, kiuj dum miloj da jaroj kreis kaj perfektigis la radon.[11] (Didaktika orientiĝo: "Pri la originaleco en la beletra verko"[12])

*Propozicio B* . La noviganta sistemo K estas malkontinueco, sed ĝi ne estas "absolute nova", ne aperis en la menso de la verkisto sen iu ajn antaŭe konataj faktoj kaj principoj, kiujn la verkisto mem ne malkovris, li nur lernis kaj uzis ilin en *novaj* konjektoj. Ĝuste tiu novo gravas, kiu naskiĝis

[11] Simbole, popola fabelo rakontas pri aroganta juna alaŭdo, kiu provokis al konkuro maljunan alaŭdon: kiu povas flugi pli alten? Nu, la saĝa maljunulino altiĝis unue sur la dorso de bonfara korvo, kaj nur poste per propra flugado - kaj gajnis la konkuron.

[12] Orientiloj: Sennombraj grandaj aŭtoroj - *Vergilius, Dante, Boccaccio, Montaigne, Molière, La Fontaine, La Bruyère* kaj multaj aliaj famiĝis per "neoriginalaj" ĉefverkoj. *Goethe* mokis la naivecon de "originaluloj" kaj nomis ilin "stultoj je propra perdo".





per kunpensado de pluraj konjektoj samtempe: en sciencoj oni nomas tion plurfakeco, plurdisciplina perspektivo, kaj tiu orientiĝo estas ege promesplena en ĉiuj homaj agadoj. Do pri kia novo temas? Ne ĉio ajn antaŭe nevidata estas la necesa novo, progreso. Jam *Immanuel Kant* avertis, ke ankaŭ la monstroj, la kontraŭnaturaj miksaĵoj estas "neantaŭvidataj". La malsana fantazio produktas ĉiam "originalaĵojn". Sekve, en la regno de la neantaŭvidata, la grava verkisto serĉas la oran grajnon de valoro kaj valideco. La hazarda "io ajn nova" povas validi nur kiel provizora eksperimento por trovi la veran novon, kiu evoluigas la antaŭan abstraktan modelon de la beletro. Kreanto, sekve, ne estas tiu, kiu sidas ĉetable kaj skribas beletraĵojn. Kreanto estis *George Stephenson (1781-1848)* - ne tiuj, kiuj post li konstruis lokomotivojn.

*Propozicio C* . Por taksi kaj hierarkiigi la valorojn, por distingi majstroverkojn disde fuŝaĵoj, novaĵon disde malnovaĵo aŭ disde trompaĵo, oni logike bezonas aprecadkriteriojn. Ĉu tio ne signifas dogmatismon? Ĉu ni metu la verkojn sur la mitologian liton de la monstra rabisto Prokusto kaj prijuĝi ilin laŭ antaŭe fiksitaj sep, ok, dek "kriterioj"? Tiel pensas multaj teoriuloj, kiuj deklaras: "En la arto ne ekzistas aprecadkriterioj"! Rigardu tamen ilian kritikan agadon kaj vi vidos, ke ili utiligas kriteriojn! Ne povas esti alie. Por ĉiu ajn homaj produktoj, la socio havas kriteriojn por determini la mezuron, en kiu konkreta produktaĵo atingis sian optimuman celon. *Dogmatismo ne signifas kriteriojn kaj principojn*, sed la transformon de tiuj en *dogmojn*, en ĉiam kaj ĉie senŝanĝajn mezurilojn, kio kondukas al nivelado de la beletro kaj al mallibereco de la verkistoj. La *impresionismo* en kritiko restis al unua paŝo en aprecado: al *impreso*, unua esprimo de *gusto* individua. Por science apreci beletran verkon, oni devas esti "fakulo en ĉiuj komponantoj de la verko" kaj ĝenerale en verkstrukturoj: la temo, la personoj, la lingvo k.t.p. plu postulas *fakulojn* (sociologojn, psikologojn, lingvistojn-stilistojn k.t.p.) kaj tiam ĉiu beletraĵo estos taksata laŭ por si adekvataj kriterioj. (Ekzempligo en AIS-seminario: Aprecado de soneto "Protesto" de *Koloman Kalocsay*)

*Propozicio D.* La ascenda evoluo de la beletro necesas la kontakton de la verkisto kun la realaj kaj kun la idealaj legantoj [13] , kun la publiko, kiu stimulas, inspiras, informas la aŭtorojn, liveras al ili signifajn elementojn de la epoka etoso kaj precipe pensigas ilin pri la artaj solvoj en iliaj beletraĵoj. La verkisto riskas iluziojn pri la valoro de la propra verko, ĉar li amas ĝin kiel patrino amas la filon. La tuja retrokuplo en la antikvaj teatroj rapide evoluigis la helenan tragedion, dum en moderna socio la verkistoj ne konkuras, sed paralelas. La publiko fakte estas hodiaŭ ekster la sistemo A - V - P, ĉar ĝi estas pasiva, legas hejme en soleco, rigardas televidajn elsendaĵojn kaj "akceptas ĉion". Tiu pasiva faktoro iĝas eĉ pli malhelpa,

[13] La *realaj* legantoj estas tiuj, kiuj fakte legas la verkon; la *idealaj* legantoj estas tiuj, kiuj optimume legos la verkon.

kiam la publiko ne interesiĝas pri la beletro, aŭ tute ne konas ĝin[14]. Niaj Esperantaj beletristoj nek kreu en "ebura turo" nek estu "poetoj sen popolo", laŭ konata esprimo de *Kalocsay*.

Tamen, la publiko ne estu rigardata kiel ĉioscia kaj ĉiamprava, kvankam la statistikaj konkludoj principe pli validas ol la individuaj. En beletro aŭ moralo, en organizado de socia vivo ktp. la publiko estas kutime tradicia, konservema, havas antaŭjuĝojn, ofte krudajn opiniojn. Kiam temas pri novaj ideoj, la plimulto kutime ne pravas. Kelkfoje ĝi voĉdonis por katastrofaj decidoj. Kiam la nova estetika informo de la beletro tro superas la akceptkapablon de la publiko, necesas iom da tempo por restarigo de la ekvilibro.

## *IV. Difino de la estetiko el praksiologia vidpunkto*

La valoro de la gravaj estetikaj atingaĵoj estas iufoje kiel arĝenta sonorilo, kiun malmultaj aŭdas kaj, aŭdinte ĝin, oni ne tuj scias, kie troviĝas la preĝejo... Ĝuste por aŭdigi tiajn sonorilojn, la socio kreis fakulojn: kritikistojn, estetikistojn kaj teoriulojn. Ankaŭ ili ne estas seneraraj, sed la sciencoj multe helpas ilian agadon. Tamen pri tio ne ĉiuj inter ili konsentas. Ĉu scienco en sfero de impresoj, gustoj kaj aliaj nemezureblaj fenomenoj? Jes, la scienco jam demonstris, ke ĉiu homa agado estas science studebla. Neniu escepto ekzistas, neniu povus demonstri escepton. La plurfaka perspektivo unue avertas pri epistemologiaj principaj eraroj, due proponas metodojn. La estetiko ankaŭ povas profiti de la atingaĵoj de diversaj sciencoj. Ĝia nuna kapablo, malkovri erarojn de la skeptikuloj rilate al estetika progreso kaj al la estetiko de la lingvo konfirmas tiujn eblecojn. En mia koncepto *estetiko estas la teorio pri la kreado kaj aprecado de la artaj verkoj*. En la tradicia estetiko, la verkistoj trovis tro malmulte da apogo. La komplekseco de la beletra verko konfuzigis la teoriulojn, ĉar, kompreneble, sen rimarki la komponantojn kaj ties funkciojn, oni ne perceptas intuicie la strukturojn. La verkistoj, do, estas kiel la virinoj, kiuj naskas belajn bebojn sed ne konas la metodon por fari tion (aserto de *Goethe*)[15]. Tamen, la homa agado estas konscia, ne mistera kiel biologiaj procezoj. Estas praksiologia ŝarĝo por la estetiko, penetri en tiun sferon. Certe, estetiko "donas ĉion, krom genio", kiel *Kalocsay* skribis en "La arto poetika". Sed

[14] *William Auld* esprimas sian bedaŭron pro tio, ke la Esperanta publiko ne konas sian poezion. Kion riproĉi do al la ekstermovadanoj? En la *Lexikon fremdsprachiger Schriftsteller von den Anfängen bis zur Gegenwart* (Leksikono de negermanlingvaj verkistoj ekde komenco ĝis la nuntempo) *3 vol., Leipzig* 1977-1980, oni ekscias pri burjata aŭ maniheja literaturoj, sed tute mankas la Esperantlingva literaturo.

[15] En bona, eĉ iom poezia recenzo pri la kantoj de *G. Timofeev, E. Nikitin* skribis (Scienco kaj Kulturo, n-ro 2/96): "Foje, analizante laŭ mia peto unu el siaj kantoj, *Gennadij Timofeev* provis per vortoj klarigi la plej subtilajn kaj emociajn nuancojn de la verko. Poste, definitive malsukcesinte, li svingis permane: 'Ne povas mi, ne eblas pervorte rakonti...'"



ankaŭ genio ne plu estas io supernatura, kiel asertis Platono. Genia estas epiteto por ege supera majstroverko de granda talentulo - sed genieco ne estas ora bulo, kiun la alte dotita personeco portas en la poŝo kaj aplikas ĝin ĉie ajn kun la sama sukceso. *Goethe* ne estis genia sciencisto. Pluraj grandegaj prozistoj aŭ poetoj malsukcesis en teatraĵoj - kaj inverse. Do, genio kaj talento estas ne nur naturaj donitaĵoj, kiuj "estas aŭ ne estas"; ili estas ankaŭ *procezoj* kun maksimoj kaj minimoj. Tiujn procezojn determinas pluraj faktoroj: denaska inteligenteco, observkapablo, kulturo, esprimpovo, diligenteco ktp., do temas ankaŭ pri faktoroj, kiuj grandparte povas disvolviĝi. Tial, orientigi junajn talentojn estas grava ŝarĝo de la beletraj sciencoj. Ĝi ne estas sendanĝera, ĉar ofte aperis iu "dirigismo" kun devigaj elementoj, kaj tio damaĝis la arton. La konkludo ne estas "absoluta libereco sen iu ajn respondeco antaŭ la beletraj etiko kaj estetiko"! La mezepoka pentrarto estis "dirigita", sed tamen postlasis ĉefverkojn - ĉar la artistoj *propravole* orientiĝis laŭ la tiamaj postuloj. La racieco en tiu ĉi problemo ne estas "ĉio aŭ nenio". Temas ne pri dirigismo, kiun praktikis politikaj tendencoj en pluraj landoj kelkajn jardekojn; temas pri *lernado*, kaj tiu racia ideo aperis jam en praa pasinteco. La Renesancaj pentraj metiejoj, la literaturaj kaj lingvaj societoj aŭ salonoj en Francio, Germanio, Italio en la pasintaj jarcentoj, la hodiaŭaj konservatorioj, teatraj altlernejoj, literaturaj rondoj havis kaj havas nur la funkcion, kulturigi la talentojn, levi ilin sur la nivelon de la arta majstreco de la koncerna epoko. Certe el la plej bona "beletra metiejo" eliras tiom da poetoj, kiom da ili eniris ĝin, sed ili ne eliras sen novaj konoj kaj verkista efika praktiko. Ni memoru la aserton de *Montaigne:* "povas lerni rapide fuĝi nur tiu, kiu havas sanajn piedoj" kaj ni observu, ke eĉ la birdoj devas lerni kaj ekzerci la flugadon. Certe, la ŝarĝoj kaj la eblecoj de la estetiko estas multe pli variaj ol mi povis skizi en tiu ĉi enkondukaj konsideroj[16]. Mia intenco estis, kiel jam dirite, nur substreki la neceson, analizi kritike, en aktualaj metodologiaj perspektivoj, la validecon de tezoj kaj teorioj, kiuj fakte kontraŭas sin, kaj konfuzas la verkistojn en la nuntempa kulturo. Oni nomas *metateorio* tiun sciencan esploron.

Laŭaŭtora leginda bibliografio pri la temo:

*Aristoteles* (384-322 a.K.) : *Poetica* (La poetiko)

*Bayer Raymond : Y-a-t-il un progrès dans l'art?* (Ĉu en la arto ekzistas progreso?) en *"Actes du XI-ème Congrès International de Philosophie", Bruxelles, vol. X, 1953*

*Boctort I.F. : Estetica literara* (Estetiko de la beletro), 2 vol., *Timisoara 1995*

*Boileau-Despréaux : L'art poétique (La poetika arto)*

*Caracostea D.: Expresivitatea limbii romane* (La esprimpoveco de la rumana lingvo), *Bucuresti 1942*

[16] Pri tiu ĉi problemaro mi aperigis en 1995 du-voluman verkon "*Estetica literara*" (Beletra estetiko), rumanlingve kun Esperantaj resumoj.

*Condorcet A.C.* : *Esquisse d'un tableau historique des progrès de l'esprit humain* (Skizo de historia tabulo de la progresoj de homa sprito). *Introduction et notes par Monique et Francois Hincker, Paris 1966*
*Coteanu Ion : Stilistica functionala a limbii romane* (La funkcia stilistiko de la rumana lingvo). *Vol.I, Bucuresti, 1975; Vol.II Bucuresti 1985*
*Croce Benedetto* : *Esthétique comme science de l'expression et linguisque générale* (Estetiko kiel scienco de la esprimo kaj ĝenerala lingvistiko). *Traduit sur la 10-ième édition italienne par Henry Bigot, Paris 1904*
*Densusianu Ovid : Evolutia estetica a limbii romane* (La estetika evoluo de la rumana lingvo). *Curs litografiat, Bucuresti 1929-1930*
*Dima Al. : Dezbateri critice* (Debatoj pri literatura kritiko), *Bucuresti 1977*
*Dufrenne Mikel : Phénoménologie de l'éxpérience esthétique* (Fenomenologio de la estetika sperto). *Paris 1953*
*Horatius* (65-8 a.K.) *Ars poetica* (Poetika arto)
*Hrapcenko M. : O progresse v literature i iskusstve* (Pri la progreso en la literaturo kaj arto). En: *"Voprosí literaturí" nr. 5, 1970*
*Huizinga Johan : Homo ludens* (La ludanta homo). Traduko el la holanda lingvo *(H.R.Radian), Bucuresti 1977*
*Kant Immanuel : Kritik der Urteilskraft* (Kritiko de la juĝkapablo), *Berlin,* 1790
*Marino Adrian : Dictionar de idei literare* (Vortaro de literaturaj ideoj). *Vol. I, Bucuresti, 1973*
*Vianu Tudor : Introducere in teoria valorilor* (Enkonduko en valorteorio). *Bucuresti 1972*
*Idem : Estetica* (La estetiko). *Bucuresti 1939*

Adreso de la aŭtoro:
*Prof. Ignat F. Bociort*
*Bd. Eroilor nr. 7/D*
*RO - 1900 Timişoara*
Rumanio

Priaŭtora informo

La aŭtoro studis filozofion kaj filologion en la Universitato de Bucuresti, doktoriĝis pri filozofio en la Universitato *Humboldt,* Berlin, estis asistento kaj lektoro en la Universitato de Bucuresti, docento kaj profesoro en la Universitato de Timişoara. Ekde 1990, kiel pensiulo, li estras la Tutlandan Universitatan Esperanto-Centron, funkciantan en Timişoara.



RECENZO

Nikola Rašič

**La rondo familia**

**Sociologiaj esploroj en Esperantio**

Edistudio, Pisa (IT), 1996

ISBN 88-7036-062-8 (192 p., 27.- NLG)

Estas konata fakto, ke multaj faktoroj de uzado kaj evoluado de lingvo klarigeblas nur surbaze de solidaj konoj pri la komunumo de tiu lingvo. Tio precipe validas por la planlingvo Esperanto, ĉar la ekzisto de sufiĉe granda kolektivo kiel 'lingvoportanto' estis kaj estas la ĉefa antaŭkondiĉo, ke Esperanto (diference de la multaj aliaj projektoj) kapablis fariĝi plenfunkcianta komunikilo. Sociologiaj esploroj pri Esperanto pro tio estas esenca kaj necesa parto de esperantologio. Ĉar tiu kampo ĝis nun estas malbone plugita, la malmultaj studaĵoj ekzistantaj apenaŭ konataj, la libro de la kroata sociologo Nikola Raŝiĉ precipe bonvenas.

La aŭtoro en la unua parto donas superrigardon pri la ĝisnunaj esploroj. Li kompare prezentas entute dek studaĵojn (la unua okazis en 1926/27, la plej freŝdata en 1992; la plejmultaj celas al naciaj Esperanto-movadoj). Raŝiĉ dividas ilin en du grupojn: estas unue simplaj statistikaj esploroj el Nederlando, GDR, Bulgario, Finnlando kaj tiu de UEA el 1991; due ekzistas esploroj "kun analizaj ambicioj", kiel Raŝiĉ pritaksas. Inter tiuj la plej ampleksaj verŝajne estas la konata de Peter Forster pri la socia strukturo kaj la valoraro de membroj de Brita Esperanto-Asocio kaj la aktuala de Frank Stocker, kiu faris enketon pri la membroj de Germana Esperanto-Asocio. La rezultoj de ambaŭ esploroj estis memstare publikigitaj (Forster 1982; Stocker 1996). Mia ĉefa intereso pro tio rilatas la duan parton de la libro, en kiu la aŭtoro prezentas sian propran enketon el la jaro 1985.

Temas pri la internacia esploro "konsistigaj elementoj de la Esperanto-kulturo". La titolo jam indikas la postuleman celon de la aŭtoro. Lia enketilo estis tre ampleksa (entute 143 kriterioj) kaj inkluzivis demandojn ne nur pri la demografia strukturo, komunikaj bezonoj kaj kutimoj de la enketitaj, sed ankaŭ pri